

# SVENSKA ESPERANTO-TIDNINGEN LA ESPERO

Jan. 1945

33 årg. Nr 1

ORGAN FÖR SVENSKA ESPERANTO-FÖRBUNDET

## Preparu la pacarmeon!

*De Ajo Allinger.*

La espero regas la homaron, ke baldaŭ finiĝos la grandmilito. Diversajn popolojn kaptis ĝermanta fervoro konstrui novan mondon sur la ruinoj. Estas tute juste, ke oni atendas de ni en la neŭtralaj landoj, ke ni faru la plejblon en la help- kaj savlaboro. Svedio kaj Svisujo havas unikan ŝancon nodi rilatojn inter eventualaj venkontaj kaj venkotaj popoloj. La junularo de tiuj landoj formos post la milito necesegan ponton inter la malamikaj partoj.

### LA POSTMILITAJ PROBLEMOJ.

Sed ĉu ni povas efektive kontribui al la internacia laboro de rekonstruado?

La postmilitaj problemoj havas ja neaŭditajn dimensiojn. Tuta nia kontinento estas minacata de pereigaj epidemioj. Plurdek milionoj de kripluloj devas esti prizorgataj, flegataj, enordataj en la socion. Pli ol cent milionoj de rifuĝintoj, evakuitoj, perforte transplantitoj devas esti kondukataj hejmen. En Germanio troviĝas nun 14 milionoj de militkaptitoj kaj fremdlandaj laboristoj. Kiu persvados ilin restadi dum semajnoj, eble dum monatoj, ĝis ilia hejmenvojaĝo povas ordiĝi? En Rusujo post la antaŭa milito troviĝis hordoj de orfaj forlasitaj infanoj, kiuj dum jaroj vagadis rabante kaj murdante. Kiel io simila estos evitata alilande nun? Amasoj da homoj bezonas manĝon por saviĝi de la morto pro malsato, amasoj bezonas vestojn kaj la plej gravajn porvivaĵojn. La industrio en preskaŭ ĉiuj landoj devas ŝanĝi sian militproduktadon en porpacan tian. Eminentaj teritorioj devas esti purigataj de ruinoj kaj denove kulturataj, vilaĝoj, grandaj urboj, tutaj landoj esti rekonstruataj. Sen troigo: nova mondo devas restariĝi komplete!

### HELPO EL MALAMEGO.

Antaŭ ĉio: la nemezurebla malamego inter la nacioj devas esti venkata per reciproka kompreno kaj interfratiĝo, se ni ne trafos en trian mondmiliton. Kion fari kun la junaj soldatoj, kiuj fariĝis brutuloj kaj kruduloj praktikinte sian murdmetion dum pluraj jaroj? Kiel ekzemple konduki la delogitan fuŝgvidatan junularon for de perfortec-menso kaj regad-arogo? Kiel eduki ilin je bonaj socianoj? La sveda kaj svisa junularo jen estas la sola, kiu tuj post la milito povas kontaktiĝi al la junul-

aro en Germanio, en la unuigitaj nacioj kaj en la okupitaj landoj. Jen estas unuavice svedoj kaj svisoj, kiuj devas kapti la iniciaton por interhelpa servo kaj rekonstruado.

Kondiĉo kaj garantiĝo por efektiva daŭra paco post la aktuala hombuĉado estas ke la junularo de Eŭropo, de la tuta mondo, travivu la internacian komunecon. Plej simple kaj en plej vasta amplekso tio povas realiĝi per internaciaj laborgrupoj. La centra ideo estas ke granda parto de la rekonstrua laboro estu donata al la militjunularo kaj ke tiu tasko fariĝu komuna altlernejo por la juna generacio. Ĉi-koncerne la du neŭtralaj landoj Svedujo kaj Svisujo havas specialajn premisojn kiel iniciantoj kaj perantoj. Por ĉi-tiu misio la sveda junularo preparu sin nun — prefere kune kun la junularo, kiu venis el eksterlando kaj en Svedio trovis sian rifuĝon.

### SVEDA ŜTATA REKONSTRULABORO.

Pluraj organizaĵoj fondiĝis kun la celo interveni jam nun, fari disponojn por ebligi rapidan helplaboron tuj post paciĝo aŭ batalhalto. La preteco de Svedujo por partopreni la internacian rekonstruadon ricevis sian unuan pli oficialan esprimon per parlamenta decido aŭtunon 1943, kiam sumo de 100 milionoj kronoj asigniĝis por tiu celo.

La 10an de marto 1944 la registaro starigis du organojn por la internaciaj taskoj. La ŝtata komitato por rekonstruado (Statens återuppbyggnadsnämnd = SAN) havas la komision planadi kaj centrale administri ĉiujn aferojn, kiuj koncernas la ŝtatan kunagon en la internacia laboro rekonstrua. Unualinie SAN konsideras liveradon de varoj kaj servoj de Svedujo al militdezertigitaj landoj, antaŭ ĉio al la nordaj najbarlandoj. La sincero kaj seriozo de nia volo fari nian kontribuon por necezezonaj suferantoj elmetiĝos ĉi-tie al provo.

La sveda komitato por internacia helpagado (Svenska kommittén för internationell hjälpverksamhet = SIH) estas kunmetita de reprezentantoj el la gvidantaj organizaĵoj, kiuj varimaniere aktivas en la internacia helplaboro: Ruĝa Kruco, Savu la infanojn, Societo la Nordo, Norvega helpo, Helpu la militviktimojn, Internacia Studenthelpo kaj ceteraj. Ekzistas krome aro de aliaj vari-specaj unuiĝoj de libervoluloj, Kristaj societoj por viroj kaj virinoj, Savarmeo, Kvakeroj, Pentekostamikoj ktp,



kiuj flanko de siaj propraj taskoj ankaŭ praktikas helpfunkciadon kaj volas subteni kaj kunagi en la internacia helpo post la milito.

Celo de SIH estas kunordi la tutan aktivecon de ĉi-tiuj diversaj organizaĵoj sur ĉi-tiu kampo kaj gvidi la svedan helpagadon filantropian. La komitato funkcias en du ĉefgrupoj.

La medicina grupo traktas demandojn pri dissendado de ambulancoj, ordado de malsanultransportoj, starigo de hazardaj malsanulejoj, ŝvitbanejoj, institutoj por liberigi de pedikoj.

La sociala grupo renkontos la plej grandajn kaj plej delikatajn problemojn, precipe koncerne translokigon de militkaptitoj, internigitoj, perforte forpelitaj kaj rifuĝintaj homoj. Flanke de ĉi-tiuj gigantaj kaj senmzure malfacile majstreblaj taskoj traktiĝas demandoj pri ekipado kaj funkciigo de infanhejmoj kaj popolkuirejoj, havigo de vestoj kaj ŝuoj, libroj kaj paperaĵoj ktp, ktp. Koncerne la materialan helpkontribuon devas, dum ankoraŭ estas tempo, preparigi grandskala staplado kaj provizado de nutraĵoj kaj aliaj porvivaĵoj, medikamentoj, bandaĝoj, serumoj kaj cetera medicina ekipo. La enorman loĝejmankon en militruinitaj landoj ni jam nun povas kontraŭlabori produktante muntipretajn lignodomojn.

### LABORGRUPOJ.

Koncerne la personan helpon starigis jam specialaj kursoj por eduki kuracistojn kaj flegistinojn laŭ iniciativo de libervolulaj organizaĵoj, ekzemple SDU kaj SISU. Internacia laborgrupo por rekonstruado (Internationella arbetslag för återuppbyggnad = IAL) aranĝas kursojn por prepari kaj eduki helpservistojn speciale instruitajn por taŭge kunmetotaj laborgrupoj. Ili staros pretaj por vojaĝi al la atendantaj labortaskoj tuj post finiĝo de la milito. Konekse al tio funkcias centra registrado de tiu personaro, kiu deklaris sin volema partopreni la rekonstrulaboron. Adreso de IAL: Herkulesgatan 22, Stockholm, tel. 21 10 22.

IAL kolektas svedajn gejunulojn, sed ankaŭ ĉi-lande troviĝantajn rifuĝintojn, kiuj en edukaj kursoj volas sin prepari por la paclaboraj taskoj. Tiaj preparkursoj okazis jam lastjare en Nissafors (Jönk.), Lidnäs (Kronob.) kaj Eskilstuna. La kursoj funkcias simile al ordinara grupo de laborvolontuloj (beredskapsläger). Oni laboras en la arbaro aŭ helpas kamparanojn. Duona tago apartenas tamen al la speciala tasko de klerigo, de praktika, intelekta kaj fizika trejnado.

La "kurskotizon" pagas la partoprenantoj do per korpala laboro, sed la salajro fluas en komunan kason, kiu prizorgas la kurselspezojn. La kursoj daŭras ordinare 4—6 semajnojn. La sumojn, kiujn la kursanoj dum tiu daŭro bezonas por liberigi sin de siaj ekonomiaj devoj al ŝtato, komuno kaj familio (imposto, luo, vojaĝo), pagiĝas el fonduso speciala por tiu celo post kontrolo de komisiono. Kompreneble tiaj preparkursoj havas komplete civilan karakteron. Ne ekzistas uniformoj, ne okazas ekzercado. Oni elektas nur vere taŭgajn homojn kun entuziasmo por la tasko.

La pacvolontulojn subtenas aro de interesitoj. Tiel ekzemple la kvakeroj donas sian apogon. Komitato fondiĝis, kiu provu kolekti monon por financi la kursojn. Ni renkontas jenajn nomojn: jur. kand. Franz Arnheim, dro Gunnar Beskow, grafino Ebba Bonde, direktoro Gunnar Cederschiöld, dro Emilia Fogelklou, majoro Nils Hellsten, fil. mag. Astrid Regnell (sekretario), adjunkto Wilhelm Scharp, Greta Stendahl (prezidanto), ŝtatkonsilantino Eva Wigfors. Alvoko dissendita por peti monon, kiu donu al la pacvolontuloj ekonomian bazon, estas subskribita inter aliaj de prof. Tore Engströmer, ĉefdirektoro Axel Höjer, direktoro de Kooperativo Albin Johansson, redaktoro Rickard Lindström, universitata kanceliero Östen Undén.

### PRAKTIKA KAJ INTELEKTA TREJNADO.

La kursplano, kiun la partoprenantoj sekvas, ne estas definitiva. Ĝi povas modifiĝi laŭ la spertoj akirotaj. La praktika trejnado povas ekzemple konsisti en la tasko organizi kaj gvidi bivakon de rifuĝintoj. La kursanoj deĵoras kiel administranto, mastrino, kuiristo, in-

fanflegistino, banisto aŭ simile. Aliuj okupiĝas per arbar- aŭ vojlaboroj ktp. Kursoj estos aranĝataj en konekso al lignindustrioj, kie la partoprenantoj sub gvido de fakuloj lernas starigi lignodomojn, barakojn kaj ŝvitbanejojn. La ĉefa akcento en la praktika trejnado estas ekzerci la kapablon orienti sin bone en ĉiaj situacioj kaj manipuli ĝustamane homojn de aliaj lingvo kaj menso.

La intelekta trejnado entenas studojn de plej diversaj temoj aktualaj, pere de studrondoj kaj prelegoj de fakuloj. Instruo de administra tekniko kapabligu la kursanojn por gvidado de laborgrupoj kaj ĉiuspeca organiza laboro. Psikologio eduku konsideri animajn militdifektojn. Samarit-instruo donu scion pri epidemioj kaj ties kontraŭbatalo. La studo de pacproblemoj profundigu la komprenon de la interna ideo de la internacia helpservado. Kantado kaj muzikado kreu atmosferon de kamaradeco inter la kursanoj.

### FREMDLINGVA STUDADO.

La studado de fremdlingvoj ne havas filologan aŭ literaturan aŭ beletran celon. Ununure estu: evoluigi la kapablon percepti fremdan lingvon kaj komprenigi sin per simplaj rimedoj. Tial la instruado klopodas forigi la "gramatikkomplekson". Por la speciala celo kunmetiĝas taŭga vortaro. La lernantoj provu divendi dirmanierojn pere de siaj konoj de laŭleĝaj sonŝanĝoj, de parencaj vortoj, de komunaj fremdvortoj ktp. Entute la lingvoinstruado ne turnas sin al la analizanta intelekto, sed ĉefe al la interna orelo, tio estas al la ritma muzika senso kaj al la imitopovo.

Estas evidente kiun gravan rolon la Zamenhofa lingvo povus ludi en la internacia helpservo, se jam nun dum la prepara stadio de la movado plejeble multaj esperantistoj, kaj svedaj kaj rifuĝintaj, diligente frekventus la kursojn kaj ceterajn kunvenojn de tiuj pacarmeanoj, trudante esperantistan stampon sur la kamaradan kunvivadon tutsimple per sia partoprenado.

### LA INTERNA IDEO.

La fizika trejnado hardu kaj fortigu la korpon por povi bone toleri fizikajn streĉojn. Ĉiu kursano kapablu gvidi simplan gimnastadon kaj sportludojn. Gravas povi okupi kaj laborigi aliajn homojn, precipe poste en militregionoj inter junuloj kaj senhejmuloj. La ĉefa celo do estas ke la helpa koruso, kiu kreiĝas tiumaniere, estu kapabla improvizi kaj decidi rapide en eventuale kaozaj cirkonstancoj. Tamen plej grava por ĉiu partoprenanto estas la povo identiĝi kun alies pensmaniero, psikologie bone kompreni alinacianojn, kaj tiel krei spiritan atmosferon, kiu ebligas fratan kunvivadon.

Militado estas la sola peloforto, kiun la homaro ĝisnune trovis kaj kiu estas sufiĉa por igi individuojn oferi proprajn interesojn por komunaj tiaj. Se oni povas trovi alian same fortan peloforton, sed libera de la militaj teruroj kaj difektigoj je homoj kaj bestoj, kreskaĵoj kaj materialo, kiu unuvorte estas positiva anstataŭ negativa, konstrua anstataŭ detrua, tiam oni povas kredi je io kio proksimiĝas al la ideala socio.

La interna ideo de la internacia helpservo estas konstrui kion homoj en sia freneco mem detruis, rekonstrui novan mondon, idealan socion. La sama ideo ĝermas nun ĉie. Estus honore al la sveda junularo, se ĝi povus krei grandskalan pacarmeon kaj kondukus ĝin al pacaj venkoj rekonstruante militdetruitajn landojn en la kontinento kaj fundamentante kamaradan konstruan kunlaboradon inter la popoloj.

\*

Esperantistoj interesitaj trakti la praktikan paclaboron povas konfide skribi al la artikolskribinto, kiu volonte ankaŭ donas ĉiujn informojn pri la agado de IAL. Adresu: Ajo Allinger, Levertinsgatan 4 III, Stockholm, tel. 53 91 98.

## Till dem, som ännu ej prenumererat

på Svenska Esperanto-Tidningen, göra vi en vänlig hemställan att göra det. Använd postgiroblanketten, som medföljde dec.-numret, om den finnes kvar. Eljest finnes giroblanketter på varje postkontor. Postanvisning kan också användas eller frimärken. Postgironummer: 578.



## Vizito ĉe rumanaj militblinduloj.

En la hotelo atendas flegistinoj por demonstracii al ni la solan hejmon por militblinduloj, kie oni instruas al ili novajn metiojn.

Blanka domo kun floranta ĝardeno, amika, blanke vestita kuracisto, ardanta pro bonvolo kaj kredo. Unue li kondukas min al sia kontoro, klarigas la metodojn kaj diversajn simptomojn de malsano. Ne, li ne nomas ĝin malsano, kontraŭe. Tie ĉi ne troviĝas malsanuloj. Se iu malsaniĝas, oni tuj izolas lin en la anekso, kiun mi vizitos poste. Malsano havas nenion komunan kun alimetiigo de blinduloj.

Ni havas tri periodojn dum la instruado, diras li. La invalidoj devas unue ricevi sian vivemon. Tio ĉi estas la plej malfacila. Poste ni instruas al ili skribadon kaj legadon, fine ili lernas novas metion.

— Ekzemple terkulturisto denove povas iĝi terkulturisto, sed ili ne povas fari tian laboron kiu postulas multe da sinmovado. Oni instruas al ili hejmajn laborojn, plekti korbojn, slojdi telerojn kaj hejman ilaron, tenilojn por falĉiloj kaj hakiloj. La plimulto, ankaŭ metiistoj, deziras reveni al la provinco, al la tero. El 99 militinvalidoj 76 volas iĝi agrikulturistoj.

Li malfermas pordon post pordo al la loĝĉambroj, ĉie estas nekredeble pure kaj bonguste.

— Ili ne povas vidi sed ili sentas tion, diras li. Devas esti tre orde kaj pure ĉirkaŭ la blinduloj.

Li haltas ekster pordo.

— Tie ĉi interne sidas oficiro kaj librotendas. Kun grandaj lerto kaj detalemo. Li estas utila. Kiam oni sukcesis konvinki la blindulon, ke li estas utila, ne plu estas danĝero.

Ĉe la tablo sidas junulo kun nigraj okulvitroj. Aŭdinte ke ni envenis, li leviĝas. Ambaŭ viroj interŝanĝas kelkajn vortojn rumane, la alparolito verŝajne nek scipovas la germanan, nek la francan. Mi kaptas la manon, kiun li etendas proksimume en mian direkton. Mi estas senkonsola, ke mi ne konas la rumanan lingvon. Kion li opinias, kion li pensas, kiam mutaj kaj fremdaj virinaj manoj premas lian manon?

Sed la doktoro diras en vigla tono:

— Li estas lerta. Ni ne prosperus sen li.

Li ripetas verŝajne la samon rumane, ĉar la blinda vizaĝo, kiu esprimis nek malĝojon, nek ĝojon, iomete heliĝas.

— Nun vi vidos la presejon. Ni havas propran presejon. Poste vi aŭdos, kiom bone la knaboj povas legi.

Ni vizitas la presejon, kie du lertaj blinduloj faras kompostojn en metalo kaj paperan matricon pri reliefa blindula skribaĵo. Poste ni vizitas la brosfarejon kaj la korbfarejon, fine ni alvenas al la legejo.

Tie ĉi oni ĝuste havas lecionon. Kiam ni envenas, ĉiuj leviĝas, sed neniu turnas la kapon. Jen staras ili, longuloj kaj mallonguloj, ĉiuj junaj. Nun mi vidas, ke ne nur militblinduloj ĉeestas, sed la plej multaj estas ankaŭ kripligitaj. Sed la doktoro fervore rakontas detale germane pri ĉiu unuopulo. Ĉi foje mi varme esperas, ke neniu komprenas germane.

— Tiu ĉi baldaŭ povos denove eliri en la mondon. Li estas bonhumora, havas nur bagatelan mandifekton. Aŭdu kiom bone li legas. Kaj la blindulo palpas per unu fingro de unu mano, sekvas tiun per la alia kaj legas.

— Bone, diras la doktoro. Li kondukas min al la proksima viro. Jen vidu, ankaŭ tiu ĉi junulo povas legi, kvankam li nur havas unu solan fingron. La doktoro prenas la manon de la junulo, montras al mi la kompatindan solecan fingron. Ĝi aspektas kvazaŭ tiu de sorĉonklo en la fabelo, ĉar ĝi estas plilongigita ĝis la manartiko. Ĉio plia estas for. Mi rigardas la vizaĝon, kie forestas la okuloj. Ĉu li scias kiel aspektas lia mano? Kian formon havas la kompatinda soleca fingro en lia fantazio? Lia alia mano estas for, li ja ne povis pripalpi tion kaj fari al si imagon pri tio.

La doktoro rimarkas en mia vizaĝo ion kion li ne ŝatas. Tie ĉi oni ne rajtas emociiĝi, ĉar tio malgrandigas la vivkuragon de la blinduloj. Li diras trankvilige:

— Li sukcesos. Li ja ankoraŭ havas la tutan brakon. Jen vi aŭdas, ke li povas legi. Ne estas danĝere kiam ili povas okupi sin pri legado.

## Du proponoj.

### I.

S-ro T. Nordlöf el Härnösand skribis al mi pri sia penso, koncerne la aperigon de tradukaĵoj el Esperanto en la svedan, kaj lia letero revokis mian malnovan penson pri la sama afero. Bona tradukaĵo de bona esp. originalo povas interesi diversajn gazetojn kaj periodaĵojn, unue kiel maloftaĵo veninta el speciala fonto, sed ankaŭ pro sia enhavo: mi pensas unuavice pri akcentite pacistaj artikoloj, sed same pri etnografiaj artikoloj, aperintaj antaŭ la milito en la diversaj esp. organoj. Sed inter la plej bonaj beletristaj esperantaĵoj same ni povas trovi tradukindajn verketojn. Kapabluloj povus eĉ elparoli sian poezian talenton per traduko de indaj esp. poemoj.

Mi volus nun demandi a) kiuj el la sveda esperantistaro povas proponi tradukindajn verkojn, prefere mallongajn kaj unuavice prozaĵojn? Se la verkoj ne estas facile akireblaj, estus tre konvene, se la verko estus aldonota al la letero; b) kiuj sentas sin kapablaj kaj emaj al — decente direktota — traduklaboro, kiu samtempe povus esti ankaŭ bona lingva ekzerco. La koncernaj personoj nepre regu la t.n. literaturan stilon; c) kiuj povus sendi titolon de tiuj gazetoj kaj periodaĵoj, kiuj supozeble havus intereson pri artikoloj kaj pri kiaspecaj?

La eksperimento ne celas esti individua ago, sed tuj post la ricevo de la respondoj kaj laŭ la rezulto de tiu ĉi esploro subskribinto komunikos siajn spertojn al la Gzetservo, resp. al la organizo.

### II.

Ne-mezurebla mizero kaj malespero regas en la mondo. Ĉu la esperantistoj ne povus kaj devus montri (preskaŭ nur simblan) helpemon sub la nomo de la diversaj korporacioj esperantaj, ke la diversaj kluboj, aŭ aliaj organizoj, speciale la pli grandaj kluboj "adoptu" po unu infano aŭ eventuale plurajn infanojn de eksterlandaj esperantistoj, kiujn atingis la fluo de la mizero. Esence ne temus pri vera, laŭjura adopto, sed nur pri tio, ke de tempo al tempo oni helpu la koncernajn infanojn per utilaj donac-sendoj kaj per konstanta priatento.

Ferenc Szilágyi,

3-e Villagat. 26, B o r å s.

Jes ja, efektive. La fingro — simila al ungego — sekvas la reliefan skribon. Li legas. Li ŝajnas fieraj kaj gaja pri sia faro.

Ondo de dankemo trakuras min kontraŭ Louis Braille, kiu, mem estante blindulo, eltrovis la blindskribon. Se li estus ĉeestinta, mi estus humile kisanta la manon de la granda bonfarinto. Anstataŭ tio mi diras al la doktoro:

— Vi agas tre brave.

Li heliĝas, li volas montri al mi sian tutan laborkampon kaj diras:

— Jen vi vidos kompatindulon, kiu neniam povos iĝi kapablulo. Malproksime en la ĉambrego leviĝas viro. Ĉu li aŭdas, ke ni proksimiĝas al li, aŭ li eble tamen komprenas germane? Li estas junulo, alta kaj impona. Sed la larĝa knabvizaĝo ne havas okulojn. Ambaŭ brakoj estas for de la ŝultroj.

— Kion li faros dum la resto de sia vivo?

Ĉu li aŭdas, ke mi vane provas firmiĝi mian voĉon? Ĉu pro tio profundiĝas la turmentita esprimo en lia vizaĝo?

Sed la doktoro diras kun kuraĝiga voĉo:

— Li veturos hejmen kaj edziĝos.

Sed nun la doktoro ne plu disponas pri siaj gastoj, eĉ ne pri siaj pacientoj. La aliaj sinjorinoj iras de viro al viro kaj parolas, ili estas feliĉaj scipovante la lingvon. Nun ili proksimiĝas al la knabo, kiu ankoraŭ staras rektita. Iu el la sinjorinoj, kiu ne estis tie ĉi pli frue, ricevas ŝokon, ŝi ekploras. Tiam ankaŭ mi perdas mian memregon, mi devas pruvi al li mian kompaton. Li ja ne havas manojn aŭ brakojn por ekpreni. Mi iras al li, alfrapetas lian dorson, balbutas torenton da vortoj, kiun li ne komprenas. Ambaŭ rumaninoj konsentas. La granda knabo ne respondas. Tiam okazas io. Stranga maltrankvilo plantiĝas de viro al viro inter tiuj ĉi junuloj, kiuj ne povas vidi. Ĉu la ĉambro plenigas novaj kaj danĝeraj to-





## 50-jarulo

**Ferenc Szilágyi.**

Kvindekjara li baldaŭ estas, nia ŝatata laborkamarado **Ferenc Szilágyi**. Fore de sia hejmlando li festos la duoncentjaran jubileon de la okazintaĵo en Budapeŝto la 1-an de februaro 1895, sed en lando, kiu kun ĝojo akceptis lin kiel gaston, en lando al kiu li ofereme faris multajn servojn per streĉa, multjara laboro kiel prelegisto, instruisto, verkisto kaj ĵurnalisto.

Dankemaj ni tiun servon rememoras je la jubilea dato sed kun iom da honto, ĉar la rekompenco kiun ni donis estas bedaŭrinde tro malgranda. La jubileo tamen donas al ni okazon esprimi nian estimon por li mem kaj por lia laboro. Se li volus resti ĉe ni en Svedlando, ni sentos tion kiel honoron, esperante, ke ni iam vidos lin ĉe pozicio respondanta al lia kapableco.

Sed ne nur al ni Ferenc Szilágyi faris servojn. Multspecan laboron li faris por sia hejmlando kiel laborema plumbatalanto hejme kaj kultura propagandisto eksterlande. Ankaŭ la tuta esperantistaro ŝuldas multon al li kaj al lia plumo. Se la limoj ne estus tiaj bariloj kiel nun, li certe estus solene gratulata de amikoj el la plej multaj landoj de la terglobo.

Unu maniero por lin honori estus nomi ĉiujn kursojn, ĉiujn prelegojn, ĉiujn vojaĝojn, kiujn li faris por disvastiĝi nian lingvon, sed mi ne kredas ke iu, eĉ ne li mem, estus kapabla fari tion. Eble li pli ŝatus, se oni farus bibliografion pri la multaj literaturaĵoj, al kiuj li ligis sian nomon. Tio estus tasko por beletristika esploristo, kiu komencu ĉe liaj junaĝaj verkaĵoj "Hungara poemaro", traduko de hungara poezio, traplugadu lian fabeloceanon ĝis liaj lingvistaj kaj literaturaĵoj esploradoj, per kiuj li riĉigis la esperantoliteraturon. Ĉar en Ferenc Szilágyi ni senhezite honoras unu el la grandaj nomoj de la esperantoliteraturo.

(Utila informo al ĉiuj amikoj de la 50-jarulo: lia adreso estas 3-e Villagatan 26, Borås.)

### CLARY KAJ HILBERT HANSSON, MALMÖ, 50-JARAJ.

La 26an de januaro sinjorino Clary Hansson povos soleni sian 50-jaran naskiĝtagon, kaj la 10-an de februaro ŝia edzo atingos la saman aĝon. Ambaŭ estas tre konataj

rentoj? Virinaj voĉoj, kiuj tremas pro ili, fremdaj virinoj, fremdaj odoroj?

La doktoro fortostreĉas por regi la situon.

— Li veturos hejmen por naskigi infanojn kaj tiel servi la landon, diras li kun gaje kuraĝa voĉo.

Sed li, kiu estas veturonto hejmen por naskigi infanojn kaj servi la landon, staradas tie kun sia kripligita, juna, korpo, longa kaj larĝa, sed tute senmova. El la vizaĝo, tordita de emocio, rigide gapas du malplenaj okulkavoj, kiuj ne povas plori.

La doktoro rapide kondukas nin eksteren...

El la sveda originalo\*: **Tiberio Morariu**.

\*) Fragmento el la verko de **Brita Vrede**: "Rumänien i ofredens år". Lindfors Bokförlag, Stockholm 1944.

inter la esperantistoj en Malmö pro sia granda intereso por niaj lingvo kaj ideo.

Aŭtune 1930 ili komencis studi esperanton en kurso aranĝita de nia klubo, kaj de la jaro 1931 ili apartenas al la klubo, kie ili ofte tre aktive partoprenis la laboron, Hilbert Hansson inter alie kiel revizoro de la klubo kaj delegito de IEL.

La geedzoj Hansson estas tre gastamaj kaj en ilia bela hejmo multaj esperantistoj — svedaj kaj eksterlandaj — trovis varman akcepton kaj povis konstati, ke tie regas vere esperanta atmosfero.

Ĉe aliaj svedaj esperantistoj ili ankaŭ estas konataj pro siaj kongresvojaĝoj ekz. al Parizo, Stokholmo, Vieno, Bern k.a., dum kiuj ili ligis multajn amikajn ligilojn kun gesamideanoj el diversaj landoj.

La esperantistoj deziras alporti al ili la plej korajn gratulojn okaze de la festotagoj. **G. H.**

## Lingva Kolono.

La svedan vorton "fortsätta" ofte estas malfacile traduki. La afero ankoraŭ komplikiĝas, se oni komparas la vorton "daŭri" kun ĝia malo "ĉesi". En Lingvaj Respondoj Zamenhof klarigis la diferencon inter ĉi tiuj du verboj jene.

"Daŭri": esti plue, ne esti finita, "ĉesi": komenci ne...i, aŭ komenci ne esti. Ekzemple oni povas diri: "la laboro daŭras", sed oni ne povas diri: "mi daŭras labori", ankaŭ ne estas bone diri (kiel mi mem [Zamenhof] bedaŭrinde faris kelkfoje): "mi daŭrigas labori", oni devas diri "mi daŭrigas mian laboron". — Oni povas diri: "mi ĉesas labori" aŭ "la pluvo ĉesas", sed ne estas bone forlogiĝi per la analogio kun "komenci" kaj diri "mi ĉesas mian laboron", estas preferinde diri: "mi ĉesigas mian laboron".

Oni ne povas ne fari al si la demandon, kial "ĉesi" povas havi tiel transitivan sencon (mi ĉesis labori) kiel ne-transitivan (la laboro ĉesis), dum "daŭri" estas nur unusenca, netransitiva (la laboro daŭras). La du vortoj ja tamen estas cetere tute analogaj same kiel "komenci" kaj "fini", kiuj estas samsencaj rilate al la transitiveco.

La klarigo de tiu malsameco inter la du verboj troviĝas en tiu difino pri "ĉesi", kiun donis Zamenhof en Lingvaj Respondoj, nome ke ĝi signifas "komenci ne esti" kaj "komenci ne...i", kie la...i staras por kiu ajn verbo. Persone mi ne povas liberigi min de la opinio, ke ĉi tiu difino estas iom arbitra.

El la supra difino pri "daŭri" sekvas, ke oni devas traduki la frazon "jag fortsatte att läsa" per "mi daŭrigis la legadon". Spite al ĉi tiu principo en Lingvaj Respondoj oni trovas ekz. en la koresponda kurso "Esperanto per post" la jenan frazon: "li daŭrigis fumi". Tute ne volante elparoli juĝon, ĉu la unu aŭ la alia esprimo estas ĝusta, mi tamen forte bedaŭras ke diversaj lernolibroj aŭ libroj, kiujn oni rekomendas al la esperantistoj por studado, donas malsamajn konsilojn pri la uzo de unu vorto.

Sed escepte de ĉi tiu neregulaĵo, la vorto "fortsätta" kaj ĝia similulo "taga vid" ofte prezentas malfacilaĵon, kiam oni volas traduki ilin en Esperanton. En Radio oni ofte aŭdas la frazon "programmet fortsätter nu med ett föredrag av...". Ĉu tie oni povas bone uzi "daŭrigi"? Ŝajnas al mi ke oni ne povas bone uzi ĝin absolute, t.e. sen akuzativa komplemento. Komparu la du frazojn "jag fortsätter efter en paus på tio minuter" (mi daŭrigos post paŭzo de dek minutoj) kaj "lektionen fortsätter efter en paus på tio minuter". En la unua frazo oni povas imagi komplementon al "daŭrigi", ekz. "mi daŭrigos tion kion ĝis nun mi faris". En la dua frazo oni ne povas imagi tian komplementon. Eventuale oni povas diri "la leciono rekomenciĝos post...". Aŭ kiel traduki ekz. "där skogen slutade, tog myren vid"? Per libera traduko oni ja ĉiam povas sin elsavi, sed se oni vere strebas al adekvata esprimo, kiel fari?

Estus tre interese aŭdi la opinion de iu lingva spertulo pri ĉi tiu afero.

**Birger Gerdman.**



## Pri tio kion ni ne diras.

"Zamenhof, la kreanto de la lingvo, samtempe estis ĝia unua prozisto" — mi legas en artikolo en la Ora Libro (verko aperinta dum la varsovia jubilea kongreso kaj rekomendinda al ĉiu esperantisto), kaj subite oni asociigas tiun ĉi frazon kun iama protesto de Beaufront kontraŭ la vorto "travidebla". Laŭ li la vorto "travidebla" estas ja nelogika, ĉar se oni parolas pri travidebla fenestro, tio ja estas logika absurdaĵo, ĉar ne la fenestro estas travidebla, sed tiuj objektoj estas tra(e) videblaj, kiuj estas trans la fenestro. La rezonado estas sendube senerara, sed same sendube malprudenta, ĉar la lingvoj havas tiom da ĝeneraligintaj mallogikaĵoj, ke la internacia lingvo perdiĝus sen ili. La arto en la afero estas, havi nek pli nek malpli da ili kaj tiun arton ja sciis Zamenhof pli ol iu alia. —

Se ni nun observas iomete la supran frazon, oni povas rimarki, ke tia laŭŝajne senkulpa kaj senripoĉa frazo povus kaŭzi multe da rimarkoj, se iu volas surprizi la precizajn okulvitrojn de pedantulo. Ni rigardu:

Zamenhof, la kreanto de la lingvo — oni ellasis la precisan nomon de Zamenhof, la nomon de la lingvo, kies kreanto li estas, kaj fine oni uzas la vorton prozisto anstataŭ la pli kompleta vorto prozverkisto. Sed — bonvolu esplori ĉiun frazon, kiun vi eldiras, kaj vi konstatas, ke la lingvo, eĉ skribita lingvo konsistas el pensoskemoj kaj pensosignoj, kiujn oni povus difini tiel, ke ili estas kvazaŭ stenografioj de tiuj precizaj ideoj, kiujn la interrilatigo, la praktiko, la ripetigo de la situacioj mallongigas en certajn skemojn. Tio rilatas ja tutajn esprimojn; ni ja diras: Feliĉan Kristnaskon!, kaj tio signifas, ke ni deziras feliĉan Kristnaskon; sed tio povas rilati unuopajn vortojn almenaŭ same ofte, eĉ en nia juna lingvo, Esperanto. Mi pensas pri la plej pure verdlingva ekzemplo, pri la nomo "Usono", kiu kreiĝis el kombino de tiaj penselasoj, respektive mallongigoj, ĝi ja estas t.n. silabvorto, en kiu la komencliteroj U.S.A. signifas la Unuigitajn ŝtatojn de Ameriko; el tiu silabvorto, la tre bonŝanca esperanta vortfarado fabrikis la vorton de Usono. Tiel kreiĝis esperanta specialaĵo, fabrikita el internacia mallongigo. Patentite Esperanta!

Tiaj "ideostenografiaj" vortoj kaj esprimoj troviĝas amase en ĉiuj lingvoj kaj ne malpli en Esperanto, kaj ne estas nia celo pritrakti la lingvosciencan konstatitajn formojn de tiaj vortoj kaj esprimoj. Ni simple registras ĉi tie kelkajn tiajn, ekz. aboco, patronia, ĝis ktp., kaj volas atentigi pri tio, ke plej ofte la formo de tiaj vortoj dependas de la ofteco de ilia uzo. Ni diras "ĝis" tre kore kaj tre ofte kaj ĝuste de tiu ofteco dependas, ke ni uzas tiun ĉi mallongigan formon anstataŭ tio: "mi salutas vin jene: ĝis la revido!"

Mi mem travivis en pli feliĉaj tempoj en Tallin tian evoluon, rapidan, sed tute individuan. La afero okazis en tiuj jaroj, kiam Tallinn apartenis al la verdaj metropoloj. Tiel verda ĝi tamen ne estis, ke en la restoracieto, kie mi manĝis tagon post tago, mi estus povinta trovi esperante, aŭ alilingve komprenantan kelneron, kaj malgraŭ la lingva parenceco inter la estona kaj hungara lingvoj, nia interrilato limiĝis je du vortoj: *tere*, per kiu oni salutas en Estonio, kaj *tennan*, per kiu oni dankas, kvankam ne tiel ofte, kiel en Svedlando. Sed mem la manĝokarto estis al mi kvazaŭ en la ĉina lingvo. La sola lumpunkto estis al mi la nomo: *boeuf à la Stroganoff*, pri kiu mi almenaŭ sciis, ke ĝi estas ia bovaĵo. Mi diris do fiere "boeuf à la Stroganoff" — mi ricevis mian manĝaĵon, manĝis kaj foriris (tamen post pago). La sekvan tagon mi manĝis sola denove, post iom da hezito mi mendis denove la sole konatan stroganofaĵon, manĝis ktp. La trian tagon la tuta procedo ripetigis kun tiu diferenco, ke mi mallongigis la nomon de la manĝaĵo jene: *Stroganoff*! Kaj mi ricevis, manĝis ĝin kun iom da pesimismo pro la monotoneco de la vivo. La kvaran tagon mi iris en la restoracion kun la definitiva intenco, ke mi mendos kion ajn, nur *Stroganofon* ne. Mi ne plu havis altetaksan opinion pri tiu sinjoro, kiu donacis sian nomon al la bovo. Mi venis en la restoracion, sidiĝis kaj la kelnero ekvidis min, alridis min, iom jesis per sia kapo kaj — mi ricevis "Boeuf à la Stroganoff". Tiu renkonto estis mia lasta kun tiu kelnero kaj mia lasta vizito en la restoracio. Samtempe tiu okazo estis la plej mallonga evoluo de esprimo ĝis plena ellaso de ĉiuj vortaj esprimiloj el la homa interkompreniĝo.

F. Szilágyi.

## Tekniko kaj scienco.

Mi komencis labori en Tekniska Nomenklaturcentralen (TNC), Västerås. Pro tio mi tre interesiĝas pri ĉiuj provoj de teknikaj terminaroj, kaj mi volonte kunlaboros kun teknikistoj-lingvistoj por krei tiajn terminarojn en esperanto.

Mi ankaŭ proponas ke esperantistaj teknikistoj kaj sciencistoj kaj aliaj interesitaj personoj organizigu por ebligi eldonadon de teknika kaj scienca revuo kaj libroj. Dum venontaj universalaj kongresoj ili ankaŭ havu fakajn kunsidojn. Antaŭ la milito ekzistis tia organizo gvidata de francoj, kaj ĝi eldonis revuon, "Bulteno de Internacia Scienca Asocio", El Ameriko venis "Scienca Gazeto".

Nun ni daŭrigu, kaj la unua tasko estas krei kontakton inter esperantistaj teknikistoj kaj sciencistoj kaj kolekti adresojn. La dua tasko estas organizi tiujn esperantistojn kaj la tria krei internacian fakgazeton. Pro la milito ni ne povas ankoraŭ tiel facile krei kontakton, sed estas tamen oportune komenci tuj kaj iom post iom gajni novan terenon.

Mi petas redaktorojn de esperantogazetoj resumi mian alvokon.

Sven Alexandersson, civila inĝeniero.  
Jakobsbergsgat. 20 B., Västerås, Svedio.

## Tria Rapsodio.

När Ferenc Szilágyi sökte intressera esperantisterna i Borås för att samla ihop vad de kunnat åstadkomma eller åtkomma av nya litteraturförsök, lekte honom ett större projekt i hågen. Han ville skapa en litterär årsbok, ett årligen återkommande samlingsverk, där skrivande esperantister kunde mötas och veta, att de skulle få läsare i många tusental. Ty årsboken skulle genom prydlig utstyrsel och varierande innehåll göras till en årlig ny- och nödvändighet för varje esperantists bokhylla.

Ferenc Szilágyi fick börja i blygsammare skala, men redan hans första rapsodi, som Skövdeesperantisterna sände ut till julen 1942 i stencilerad upplaga, slog an och föranledde den tryckta Dua Rapsodio till julen 1943, och 1944 har förlaget i Stockholm kommit med en Tria Rapsodio, även den i Szilágyis regi.

Paul Nylén har skrivit den inledande artikeln om Samarbete och lyckas där på ett fåtal rader säga allt om esperantos nödvändighet för den, som vill allas samarbete. Professor Björn Collinder ger en kort, men träffande utredning om samspelet mellan språk som ögat fattar och språk som örat fattar — optika lingvo kaj akustika lingvo. Dr Stenström skriver intressant om översättningslitteratur. En översättning av doktor Ernö Hoffmans klarläggande av vårt ögas funktion bör också nämnas. Mellan dessa stor-artiklar ha mer än 20 författare och översättare fått strö in utvalt gods av noveller och poesi, av vilka det vore frestande att nämna några, men det bör överlätas åt läsaren själv att välja bland dessa pärlor. Törs vi omtala att vi särskilt fastnat för Almroths översättning av Dan Anderssons "En spelmans jordefärd"?

Tria Rapsodio hedrar medarbetare och förlag och först och främst vår 50-årsjubilar, dro Ferenc Szilágyi,

## Rättelse.

**La mondlingva problemo.** Antaŭ ol vi denove tralegos mian tradukon de la artikolo de prof. Collinder, bonvolu korekti kelkajn preserarojn, kiuj ĝin malbeligas (en n:ro (12/44) kaj eĉ ĝenas la komprenon.

Meze sur la unua kolono oni legu: Je **supra vido**. Kaj sur la 7-a linio post tio: Kiel lingvo de la **diplomataro** ĝi estas jam preta **forpremi** la francan.

Supre sur la dua kolono, 4-a linio: kapablas en ŝanceligo..., kaj sur la 6-a: pledantoj malbone **sukcesos**. Preskaŭ meze: aŭ tentas al **mokrideto**. Kontraŭ la fino de la sama kolono: Nacia lingvo ne povos fariĝi mondlingvo se ĝi ne elpuŝos ĉiujn aliajn lingvojn naciajn, kaj pri tio, kompreneble, ne povas esti diskuto, **ĉiuokaze** ne en nia epoko.

Komence sur la tria kolono (6-a linio): Kiam la latino estis plej **vivoforta**.

En la fina paragrafo: Novial kaj Latino sine **flexione**.  
Paul Nylén.



## Esperantoundervisning i folkskolan

Svenska Esperantoförbundets pressinformation meddelar:

Allt flera skoldistrikt inför nu undervisning i esperanto. Ett meddelande har just nått oss att Karlskoga anordnat undervisning i hjälpspråket. När det blev fråga om att börja med s.k. fritidsverksamhet vid skolorna i staden, väcktes också frågan om att ta upp esperanto på programmet. Ett sammanträde hölls mellan intresserade lärare och representanter för ortens esperantoförening. Härvid beslöts att man i första hand skulle företa en undersökning för att utröna, hur stort intresset bland barnen kunde vara för esperanto. Det visade sig då att en stor mängd barn ville delta i kurser, om sådana komme till stånd.

Det blev nya överläggningar om undervisningens utformande, och man enades om att undervisningen skulle bedrivas på eftermiddagarna en timme i veckan. För att det inte skulle bli för mycket hemläxor beslöt man att kurserna skulle ledas efter den s. k. che-metoden. Vidare skulle undervisningen vara helt kostnadsfri för barnen.

Det är meningen att man så snart som möjligt ska försöka få till stånd en enkel korrespondens med andra esperantostuderande barn i vårt land. (Med utlandet är ju förbindelserna nästan omöjliggjorda.)

Vidare kommer en lärobok, lämpad för självstudier, vid kursens slut att utdelas till de elever, som med intresse och flit deltagit i undervisningen. — Tills vidare är det endast sjundeklassisterna som studerar esperanto. Tre kurser med sammanlagt 70 elever är i gång.

## EL FINNLANDO.

**Nova Esperanto-Gazeto.** S-ro Otto Pellikainen eldonos novan gazeton por la finnaj esperantistoj, nomatan "Esperanto-airut" (Esperanto-Heroldo), kiu versajne ricevos afablan akcepton, ĉar finnoj dum multaj jaroj ne havis propran gazeton. La gazeto aperos en urbeto Seinäjoki, komence de 1945.

**Ligo por akcelado de komplezemo** aperigis flugfolieton, kiu havas saman nomon kiel la ligo mem. Ĝi estas presita en la lingvoj finna, sveda kaj esperanta. En ĝentila maniero oni faras propagandon por la komplezemo kaj kristana bonvolemo. Ĝi aperis en la urbo Turku (Åbo).

**Komuna tendaro kaj esperanta kurso** kun svedaj esperantistoj en Lomaakylä en Punkaharju (libertempa vilaĝo) 8—14 julio estas en planado kaj versajne realiĝos, se la bezonata mono estas ricevebla. Dum la kurso okazos ekskursoj al ĉarma ĉirkaŭaĵo, kaj oni eble prelegos ankaŭ pri la finna banejo, kiun oni kredeble vizitos post la prelego.

**"La Nova Tago"**, maŝinpresita familigazeto de finnaj geesperatistoj estas eldonita (n-o 3) de Inst. Antti Rasku en Sääksjärvi. La numero enhavas 21 riĉajn, valorajn paĝojn, verkitajn de multaj ges-anoj. Nun la n-ro ĉirkaŭadas grupojn kaj izolajn s-anojn, al kiuj la gazeto estis kiel tre bonvenita Kristnaskdonaco. La unuan numeron de la gazeto redaktis konata finna pioniro, H. Salokannel, kiu do estas la "patro" de tiu ĉi entrepreno. — Oni gratulas la ĉefredaktoron kaj la helpintojn.

Sv. K:nen.

## FMS Föreningen Mellanfolkligt Samarbete (Interpopola Kunlaboro)

La 15 oktobro 1944 estis en Stockholm fondata Föreningen Mellanfolkligt Samarbete för fred (FMS) (La Asocio Interpopola Kunlaboro por paco) el tri malnovaj svedaj aŭ nordlandaj pacorganizoj. SEF kolektive apartenas al FMS kaj reprezentantoj estas Sven Alexandersson kaj Ernfrid Malmgren.

Kiel kelkaj aliaj landaj organizoj SEF rekomendas al siaj grupoj elekti po unu "kontaktulon". Por tiu kontaktulo la grupo pagu jarkotizon al FMS, kaj tiu peru la kontakton inter la grupo kaj la pacorganizo. La jarkoti-

## SEF Kolono

### FRAN FÖRBUNDSSTYRELSEN.

#### Direkta medlemmar i SEF.

Under år 1944 uppgick antalet direkt anslutna medlemmar i SEF till 113. För år 1945 har redan — kanske tack vare postgiroinbetalningskortet som bifogades förra numret av tidningen — 64 medlemmar redan inbetalt sin avgift.

#### Klubbarnas medlemstal

har ökat något sedan förra rapporten. Av någon oförklarlig anledning uppgavs i förra rapporten medlemsantalet i Hallsbergs Esperanto-Förening till 13 i st. f. 15. Vi kunna nu meddela, att Göteborg inbetalt för ytterligare 2 medl. (s:ma 21), Herrljunga 6, Norrköping 3 (s:a 42), Nässjö 3, Skövde 25 (s:ma 33), Stockholm 3 (s:ma 107), Vingåker 8.

#### Propagandakassan (postgiro 2012)

har, fastän insamlingen officiellt avslutades med utgången av oktober månad, erhållit ytterligare bidrag, för vilka vi hjärtligt tacka, nämligen följande: Kristianstads Esp.klubb 10:—, från Vetlanda Gunnar Karlsson 15:—, Arne Sjögren 5:—, Ture Malm 5:—, Erik Karlsson 10:—, från Malmö insamlat bland medlemmarna 181:83 och anslaget från föreningen 118:17, från Lunds Esperantoklubb 10:— samt slutligen från kyrkoh. Gunnar Edberg, Barsbäck, 5:—, tillsammans kr. 360:—. Förut redovisat kr. 1.245:65. Summa kr. 1.605:65.

#### SEF:s garantier (postgiro 2012).

På årsmötet i Karlskoga beslöts inrättandet av SEF:s garantier. Garant betalar utöver ordinarie medlemsavgift minst 10 kr., eller för övrigt hur stort belopp som helst, dock helst slutande på jämmt tiotal kronor. Av detta belopp avses hälften gå till Propagandafonden och hälften direkt till SEF för bestridande av propaganda-, tidnings- och andra löpande utgifter. Garanterna erhålla ett särskilt kort såsom kvitto på erlagt belopp men komma icke att rapporteras i tidningen. Blir antalet garantier stort, planeras utgivandet av en årsbok för garanterna. Till slut ett gott nytt år till alla SEF-medlemmar.

Birger Gerdman.

#### S-ro MORARIU

ber oss meddela esperantisterna, att han skall hålla föreläsningar i Härnösand med omgivningar under en vecka i februari (adress: T. Nordlöf, Torrom). Han begagnar gärna tillfället att under resan även besöka andra esperantogrupper och enskilda esperantister och föreläsa på esperanto och svenska, ävensom vid militära föreläsningar.

S-ro Morariu har nyligen av Försvarsstabens bildningsdetalj blivit godkänd som "fältföreläsare". Motsvarande godkännande har han tidigare erhållit av Folkbildningsförbundet.

Eventuella inbjudningar kunna ställas direkt till: SEF:s konsulent T. Morariu, Jakobsgatan 32, III, Stockholm C (tel. 20 00 43).

zo estas 8 kronoj kaj la adreso: Föreningen Mellanfolkligt Samarbete, Lilla Nygatan 4 IV, Stockholm, postkonto 509 90. Membro ricevas la revuon Mellanfolkligt Samarbete, kiu aperas per 10 numeroj jare.

La lasta numero de la revuo enhavis artikolojn pri: Internacia orientado — Ĉu la elefanto estas pli interesa ol la homo? — La malgrandŝtatoj kaj la estonto — Daŭrigo de la milito per aliaj rimedoj — La naturrajto kaj la batalo por demokratio — La emancipo de la eŭropaj judoj — Ŝtato kaj konstitucio en Sovetrusujo — Ĉu la akvolupo englutos Holandon?

Ciuj estas legindaj artikoloj pri internaciaj problemoj.

S a l e x.



# SVEDA KRONIKO

**LUND. 17.8.** La klubo kunvenis en la kafejo "Eva". Pro militservo nur kelkaj membroj ĉeestis. S-ro G. Lidbjer proponis ke la membroj diskutos pri tio, ke la klubo mem luos ĉambron al siaj kunvenoj ktp. Li opiniis ke estos pli bone havi propran ĉambron por ke la klubo uzu ĝin laŭ deziro. Post longa diskutado la klubo decidis prokrasti la aferon ĝis pli bona tempo. Poste okazis amika kunestado. — 13.10. La esperantoklubo kunvenis en Brandstationen. Vicprez. malfermis la kunvenon. Decido pri la aŭtunaj kursoj. La klubo decidis aranĝi daŭrigan kurson en ABF. S-ro O. Anderberg estis elektata kiel gvidanto. La kurso estos nomata "konversacia rondo". S-ro K. Landgren aranĝos kiel antaŭe komencan kurson en S:t Lars kaj ankaŭ gvidos tiun kurson. Cirkulero alvenis de la propaganda fondo, kiu temis pri mon-kolektado al la fondo. La klubo decidis donaci dek kronojn el la kluba kaso. — 12.12. La klubo festis Luĉio-feston en la hejmo de ges-roj Weiland. Dankon al ili! Ne multaj gemembroj ĉeestis, sed tamen ni havis gajan Luĉio-vesperon kaj atente rigardis la belan Luĉion, kiam ŝi envenis en la ĉambron. Poste okazis kafrinkado, fotografado kaj babilado ĝis 23a horo. — Pri la kursoj ni sciigas: 1) ke ni havas konversacian kurson, en kiu pli ol dek gemembroj partoprenas. Gvidanto estas s-ro O. Anderberg, kaj ni kunvenas ĉiun vendredon. Ni uzas la librojn "Sistema Kurso" kaj "Hasse Z." kiel studmaterialon, 2) ke s-ro K. Landgren gvidas komencan kurson en S:t Lars. . N.P.

**STOCKHOLM. Grupo Esperantista de Stokholmo.** La 6an de decembro ni, sekvante inviton de la Sved-rumana Asocio, anstataŭis nian kutiman kunvenon per vizito en la Etnografa Muzeo, kie nun troviĝas ekspozicio pri rumana hejmindustrio ĉefe konsistanta el vestoj, tukoj, tapiŝoj kaj kostumbildoj. S-ro Morariu donis al ni klarigojn. Ni admiris la artplenajn ornamojn de la vestoj hereditaj de la antikvaj dakoj, ĝenerale brodteksitaj sur blanka fundamento per stiligitaj formoj. — La 13an ni travivis tre belan kaj romantikan Luĉiovesperon, kies aranĝon ni dankas al s-ro Håkansson; lia edzino ludis la rolon de Luĉio. Eksonis diversaj kantoj: solaj, ĥoraj kaj komunaj. — La 20an ni festis naskiĝtagon de Dro Zamenhof, la "tagon de la libro", ĉe kiu s-ro Morariu faris la festparoladon pri Esperanto kaj ties literaturo. Konstatinte, ke ankaŭ Esperanto havas sian sentan atmosferon kaj tradicion, ke tradukaj verkoj estas same gravaj kiel originalaj, akcentinte la rolon de Esperanto kiel kulturperanto, li priparolis kelkajn de la plej gravaj verkistoj, citante, laŭenhavante aŭ komplete, ekzemplojn el iliaj verkoj: Grabowski, Kabe ("La faraono"), Baghy (poemon "En Svisujo"), Kalocsay ("La sonoriloj"), Schwartz ("La almozulo"), Forge, Stellan Engholm (tradukon de poemo de Bo Bergman) kaj finis per la admono, subteni la literaturon per aĉeto de libroj.

**LA KABANO,** la esperantista somerhejmo de Migranta Rondo ĉe Jakobsberg apud Stockholm, dum la somero 1944 povis registri 227 vizitojn kaj 148 tranoktojn. Korespondaj ciferoj por 1943 estis 113 kaj 30, do konsiderinda kresko. S a l e x.

## KORESPONDADO.

Sep junuloj en esp.-studrondo deziras korespondi por perfektigi en la lingvo. Esperantaj leteroj de svedaj studemuloj ankaŭ estas bonvenaj. **Guldsmedshyttans Esperantocirkl** (Fritz Carlsson), Eriksberg, **Guldsmedshyttan**, Svedlando.

## Letervespero

la 24an de februaro. La aktivaj knabinoj kaj knaboj de LEK atendas multajn salutojn, kiuj povas sekvi interesan korespondadon. Adresu:

**LABORISTA ESPERANTO KLUBO**  
E. Norman  
Nobelvägen 117 A, M a l m ö.

## Veiko Johannes.

Rakonto de Einar Wallquist. Trad. H.j. Dahlén.

Semajno de streĉo kaj maltrankvilo. La radiaj disaŭdigoj, kiuj ĝis tiam ĝojigis kaj edukis nin, igis nin pli proksimen al la viva kulturo de la grandaj popoloj, iun tagon ekpleniĝis de sortoplenaj militmarŝoj kaj raportoj, ree raportoj pri atakoj kaj bataloj. Jen, la milito estis veraĵo.

Je tiuj novaĵoj ni, kiuj antaŭe travivis milittempon, spertis fantomteruron. La junaj ilin renkontis kun miro, kortuŝitaj, scivolaj. Al ni ĉiuj sekvis laboro de iu aŭ alia speco en la servo de la defendpreteco.

Iun tagon de oriente venis novaĵo pri perforta atako. Brulis tie bombitaj domoj kaj fuĝis senhejmaj homoj laŭ la vojoj. Ĉu de tie venos fuĝantaj aroj, kiuj petos kaj insistos pri loĝejoj en niaj hejmoj? Ĉu la teruroj kaj severaj leĝoj de la milito atingos ankaŭ al ni? Tiun vintron naskiĝis multaj pensoj, malnovaj perceptoj malklariĝis, novaj vidpunktoj elkreskis. Sed precipe io en ni malmoliĝis. Ni kuniĝis kiel neniam antaŭe, ni volis ion, ni volis en paco vivi nian svedan vivon, esti kaj resti svedoj.

Sed tiun vintron neniun ŝtormo superŝutis nin.

Fariĝis nia destino provi per kunlaboro de multaj manoj laŭ plej bona povo helpi al tiuj, kiuj staris sur la vojo de la perforto, tiuj kiuj ĉifonitaj estis forbalaataj aŭ buĉataj, postlasante senhavajn parencojn. La virinoj trikis, la buboj slojdis lambastonojn, la viroj donacis de sia laborenspezo kaj de temp' al tempo iu forvojaĝis nemulte dirante pri tio.

Por esti pretaj, oni komencis ordigi por la kazo, ke pli grandaj aroj da fuĝantoj atingos la arbarregionon, kunmetis vestojn en provizejojn kaj aranĝis loĝejojn. Sed de oriente ne venis multaj en nian montaran regionon. Iun tagon oni tie faris pacon.

La semajnoj pasis. Raporto sekvis raporton. Viroj en mardangero. Malcerteco kaj streĉo. Tiam subite ekestis nova ventego — okcidente, ĉe niaj plej proksimaj najbaroj transe de la limo. En la pacaj valoj, kie ni havas amikojn kaj konatojn, kie ni konas la hejmojn kaj ĉiam spertis gajan gastigemon, subite furiozis bataloj inter militistaroj el fremdaj landoj, situantaj malproksime trans maro kaj vastaĵoj. Estis en tio io neverŝajna, malkredebla. En "Saltdalen", nia bela valo najbara, la domoj brulis, fuĝis la homoj, la pontoj estis krevigitaj, estis bataloj.

La telefonan linion trans la altmontaro oni baldaŭ rompis. Nur per onidiroj de domo al domo ni ricevis avarajn sed terurajn novaĵojn pri tio, kio okazis transe de la montegaro.

Super abruptoj kaj en malaltaĵoj de la grandaj masivoj la neĝo ankoraŭ kuŝis profunda, kvankam la printempa suno ĵetegis lumon sur la vastaĵojn kaj eldegelis pecetojn da nuda tero ĉe la domanguloj. La noktoj estis malvarmaj sed brile serenaj, kiel printempe ordinare estas.

Iun tagon venis stranga novaĵo: Oni fuĝas trans la altmontaron laŭ la montvaloj kaj riveretoj al ni, for de la militaj teruraĵoj, bruloj kaj bomboj. Laŭdire estas grandaj grupoj da virinoj kaj infanoj survoje.

Nun ni ekhavis uzon por la loĝejoj, kiujn ni pretigis. Kaj dum kelkaj laborplenaj printempaj semajnoj ni stariĝis antaŭ pli da malĝojo kaj homa sufero ol ni iam antaŭe vidis en tiel mallonga tempo. Kaj tamen al ni atingis nur malgranda splito de la krevo, kiu nun disbatas korpojn kaj animojn ĉirkaŭe sur la tero. Estis tiam ke mi renkontis al Veiko Johannes.

Pri liaj pasintaĵoj mi ne scias pli ol tion, kion rakontis lia patrino kaj la aliaj finnoj. Lia patro estis minlaboristo ĉe Salmijärvi en la regiono de Petsamo. La bubo kreskis en malriĉa hejmo, kie naŭ gefratoj kvereletis kaj ludis, insistis pri la zorgoj de la patrino kaj baldaŭ devis kunhelpi je tiaj laboretoj, kiujn li fortis.

Iun tagon ekestis la milito. Simile al multaj aliaj la patro devis rapide aliĝi al la soldataro, kaj la patrino devis sola elporti la respondecon pri la hejmo kaj la zorgojn pri la infanaro. Subite oni ricevis ordonon fuĝi, senpere, tuj, en la sama minuto. La rusoj estis venantaj. Oni



nur povis kunmeti la plej necesajn objektojn, kalkuli la idojn, levi la plej etan sur la brakon, preni Veiko Johannes ĉe la mano kaj, kun kelkaj idoj antaŭe, aliaj sekvantaj, fuĝi en la direkto al Norvegujo, plena de angoro, ĉasata kaj lacega. Fuĝi tiom kiom permesis la fortoj, kiom ajn doloris la koro, kiam oni de kelkkilometra distanco de la hejmo vidis kiel la domo, la hejmo, ĉio kion oni posedis, brulas per grandaj bruantaj flamoj, kiuj rugaj lekas la pinojn ĉe la farmeto. La hejmo, kiun oni en malriĉeco laborege konstruis, ne devas iel utili al la malamiko.

(Forts. i nästa nummer.)

### SOLVO DE LA KRISTNASKA KRUCVORTENIGMO.

**Vertikale.** 1. Aŭreolo. 2. Nubo. 3. Gaso. 4. Cejano. 5. Utilis. 6. Oro. 8. Uro. 9. Aso. 11. Logis. 13. B.D. 15. Kokso. 17. Anemono. 19. Butler. 20. Simpla. 23. Pi. 24. Sur. 25. Iam. 28. Lite. 29. Sole. 30. Nek. — **Horizontale:** 1. Abnegaciulo. 7. Rebusaj. 10. Ilo. 12. Orosablo. 14. Ok. 16. Ondiga. 18. Lob'. 21. Sin. 22. Okupis. 26. Se. 27. Stimulas. 30. -nol-. 31. Primolo. 32. Korkamereto.

**Gajnintoj:** Gustav R. Johanson, Tegnérsgatan 16, Karlstad. 2. Nils Persson, Norra Nöbbelöv, Lund.  
La premioj venos.

### NOVA ADRESO.

Sven Alexandersson, Jakobsbergsgatan 20 B, Västerås.  
Telefono 318 69, poŝtĉekkonto 190976.

## “Latinets arvtagare”

har blivit det förkortade, populära namnet på den lika populära lilla propagandaskriften

Esperanto — latinets arvtagare  
— nationalspråkens jämlike

av professor *Björn Collinder*  
läroverksadj. *John Stenström*

Dess stora propagandavärde och synnerligen lättillgängliga innehåll har gjort den till ett värdefullt dokument i esperantorörelsens strävan att vinna erkännande.

Vilket värde skulle det inte ha, om varje esperantist rekvirerade ett ex. och sände det till någon icke-esperantist!

Vi skola t.o.m. spara eder besväret med att själv skicka honom det — vi göra det gärna — genom att ni sänder oss 1 kr. pr postgiro (578) eller i frimärken jämte adress på den ni vill uppvakta med ett ex.

**FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO,**  
Fack 698, Stockholm 1. Postgiro 578.

## För kurser och självstudier.

Systematisk kurs i esperanto (Seppik—Malmgren)	1:—
Kurs i Esperanto (Fritz Lindén)	0:90
Dr Szilágyis kurs i esperanto	2:—
Praktisk lärobok i esperanto (Jansson)	2:—

### ORDBÖCKER

Svensk-Esperantisk Ordbok	inb.	7:50
Esperantisk-svensk ordbok	inb.	5:—
Dubbel Fickordbok i Esperanto		2:50
Esperanto-Parlör		0:75

**FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO,**  
Fack 698, Stockholm 1.

## Svenska Esperanto-Tidningen

### La Espero

Organ för Svenska Esperanto-Förbundet

**Postadr.:** Box 698, Stockholm 1.

**Redaktör:** Eva Julin, Gps I a, Sthlm.

**Ansvarig utgivare:** W. Wahlund.

**Prenumerationspris:** helt år kr. 4:—. Lösnummer 0:35.  
Utkommer en gång i månaden.

**Annonspris:** 20 öre pr mm. **Korrespondensannons:** 1:50.

**Expedition:** Förlagsföreningen Esperanto, Sveavägen 98, Stockholm. Tel. 31 65 01. Postgiro 578.

**SVENSKA ESPERANTO-FÖRBUNDET** (Sveda Esperanto-Federacio), Tegelbacken, Stockholm C. Tel. 20 00 43. Postgiro 20 12.

Avgiften i SEF: Direkt anslutna medlemmar erlägga 7:50 kr. pr år och erhålla tidningen gratis. Föreningar erlägga för varje medlem en årlig avgift av 2:— kr. Varje ansluten förening erhåller ett exemplar av tidningen gratis.

**FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO** u. p. a., postadress: Box 698, Stockholm. (Expedition: Sveavägen 98.) Tel. 31 65 01. (Förlagschefen: 30 75 15.) Postgiro: 578. (Böcker, tidningar, korrespondenskurser o.s.v.).

**SVENSKA ESPERANTO-INSTITUTET,** Tegelbacken, Stockholm. Postgiro 5 15 11.

**INTERNACIA ESPERANTO LIGO — IEL** (Sveda Teritorio): Cefdelegito Karl Wästfelt, Cedergrensvägen 27, Stockholm 32. Poŝtĉeka konto 15 12 88. Kotizoj: Membro kun jarlibro kr. 3:—; Membro-Abonanto 8:—; Membro-Subtenanto 20:—; Patrono 80:—.

## Hans Christian Andersen

### liaj vivo kaj verko.

Av Bibliotekisto Chr. Heilskov.

**Pris** (inkl. oms.) 2.10 kronor.

(Porto vid förskottslikv. 0.10; vid postförsk. 0.35)

En livfull och i högsta grad intressant skildring av den ryktbare danske sagoberättarens dramatiska liv från barndomens torftiga dagar till det sena erkännandet.

**Upplagan är mycket begränsad!**

**FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO**

Fack 698, Stockholm 1. Postgiro 578.

Likvid pr postgiro, postförskott eller i frimärken.

## Esperanto-magasinet

# 3a Rapsodio

har utkommit.

Redigerad av **Dro F. Szilágyi.**

**Pris** 2.00 vid förskottslikvid.

2.25 vid postförskottslikvid.

I original eller översättning äro bl. a. följande författare representerade:

<b>Peter Freuchen</b>	<b>Frigyes Karinthy</b>	<b>Paul Nylén</b>
<b>Dan Andersson</b>	<b>Sven Backlund</b>	<b>Ella Nilson</b>
<b>Björn Collinder</b>	<b>Anton Ĉehov</b>	<b>Einar Adamsson</b>
	<b>John Stenström</b>	

jämte ett flertal andra, som i poesi eller prosa ge oss ett urval god esperantoläsning.

**FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO**

Fack 698, Stockholm 1. Postgiro 578